3-a Jaro. N-o 153 APERAS SEMAJNE 8. Septembro 1927



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanty

SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerchner

ŜTATA JUSTECO ESTAS NUR VORTO


Post la malesperaj fortuzoj de la internacia Laboristaro kaj Intelektularo, okazis tio, kion neniu atendis: la grandaj martiroj de la amerika kapitalismo, **Sacco** kaj **Vanzetti** estas ekzekutitaj.


Du idealistoj — aŭ anarĥiistoj — estis en 1920 pro iu nekonata de ili mortigo arestitaj, *sep* jarojn juĝataj kaj *sen pruvoj* je morto kondamnitaj . . .

La sorto de tiuj du kondamnitoj ekscitis la spiritojn. La protesta internacia ago por la senkulpaj akuzitoj, laŭ siaj forto kaj dimensioj, estas malofta kaj tre simptoma fenomeno: malofta, ĉar ĝi superas eĉ la faman "Dreyfus-aferon", kiu skuis Francion en la fino de la lasta jarcento kaj trovis eĥon fremdlanden, simptoma, ĉar neniam ĝis nun la publika opinio defendis per tia forto la viktimojn de la militanta kapitalismo.

El la tuta mondo estis sendataj telegramoj por ilia amnestio. Eminentuloj kiel Romain Rolland, Herriot, Mackdonald k. a. alvokis, ke oni ne faru juĝeraron per la ekzekuto. En la tuta mondo okazis sennombraj protestoj kontraŭ la intencata ekzekuto. Grandaj organizoj kaj unuarangaj aŭtoritatuloj, la tuta liberala gazetaro de Eŭropo kaj Ameriko pledis por ili. La fakto, ke Sacco kaj Vanzetti vivis *tutajn sep jarojn* kun la ĉiutaga, ĉiuhora kaj ĉiuminuta penso, ke ili povas ĉiumomente esti ekzekutitaj, igis eĉ la faŝistojn kaj la papon postuli amnestion por la du mortkondamnitoj, ĉar ili ja sufiĉe elpagis eĉ la plej teruran krimon.

La kunsento, la simpatio, kvankam venanta ĉefe el komprenebla humaneco, estis tutmonda kaj klare montris, ke la justemo kaj la kompatemo estas ecoj ŝatataj en la tuta mondo. Kaj ŝtato, kiu malatentas aŭ forgesas tion, perdos sian prestiĝon. Kaj malgraŭ la tiel klara kaj laŭte esprimata publika opinio, Sacco kaj Vanzetti estis *ekzekutitaj.*





Distingiloj de la Usona "Kulturo"! — Elektra seĝo kaj dolarsuno.
(Supre: la buĉistoj, malsupre: la viktimoj)

Ekzekutitaj, ĉar, laŭ senatoro Bora, "estas humiligo por la amerika popolo (sic!) turni eĉ plej malgrandan atenton al la fremdaj protestoj kaj al la manifestacioj de la amerika Proletaro".

Ekzekutitaj post kiam la viktimoj tiel longe estis turmentataj pro la teruro de la mortkondamno, ĉar "la intereso de la juĝaparato postulis, ke la kondamnitoj estu vivaj ĝis la plej alta instanco de la ŝtato diros sian vorton". Ekzekuto, kiu egalas leĝigitan mortigon, provokita de politikaj motivoj.

Ekzekutitaj, ĉar la politikaj konvinkoj de la arestitoj transformiĝis en krimon, kaj la krimo ricevis politikan karakteron. Nur tial "kulpaj aŭ senkulpaj ili devas esti kondamnitaj je morto", kiel jam antaŭ la juĝado deklaris iu juĝkonsilanto, ĉar *"pli bone estas kondamni du senkulpulojn ol mortigi la kredon de la publiko en la forto de la leĝoj"*. Ĉu tiu leĝo, kiu ne estas simbolo de senpartia justeco, povas atendi obeon aŭ inspiri estimon ĉe la homoj?! — Ne, milfoje ne!

La afero Sacco kaj Vanzetti por la burĝaro estis do ne afero de la justeco, sed afero de la forto. Tiu ekzekuto estas por ĉiu libera homo ago de barbareco, tiu justeco estas nek moderna, nek homa, nek inda por la XX-a jarcento. Prava do estas la konvinko de Van-

VII-a Kongreso de SAT

(Daŭrigo de la raporto)

Unua laborkunsido

Fine la administranto povas prezenti la *Raporton de E. K.* Ĉar la aliaj raportoj jam aperis en "S-ulo", *Lerchner* donas nur la *kasan raporton.* Ĝi montras la konstantan kreskon de la Asocio kaj bonan gvidon de la afero. El tiu raporto oni vidas, ke tra niaj manoj fluis multe da mono kaj certiĝas, ke nur kun sufiĉe bona financa bazo ni povas progresi. La kasraporton kontrolis speciala komitato en Leipzig kaj trovis ĉion en ordo.

Sekvas diskuto pri la kasraporto, kiun partoprenas Deubler, Boubou, Lerchner, Riese, Cierpka, Bässler kaj Glodeau. Kontraŭ la atentigo de Deubler pri ŝparado ĉe la dungo de la administraj oficistoj, evendiĝis, ke la laboro en la Administrejo estas tiom granda, ke la dungitoj fordonas al ĝi multajn horojn nepagatajn. Tie ĉi estas ne eble fari pli grandan ŝparon. Al la demando de Deubler, kial oni ne sciigis pri dungo de oficistoj al la anoj, Lanty respondas, ke la E. K. sola havas la taskon laŭ punkto 4 de la Regularo — dungi aŭ maldungi oficistojn kaj difini al ili salajrojn. Cetere la Sektor-Konsilantoj estis informitaj per cirkuleroj.

Starr demandas, ĉu la kasraporto aperos en la gazeto. Lerchner respondas, ke ne estus saĝe publiki ĝin kaj donas pri tio klarigon, kiu ricevas unuaniman konsenton.

Ĉe la voĉdono, la kasraporto estas unuanime akceptita, kaj la Prezidanto esprimas ĉies opinion, dankante la administrantaron de SAT pro la bona funkciado dum la lasta jaro.

K-do Roux je la nomo de la K. K. sciigas, ke je la 14-a h. tute precize la kongresanoj estu en la kongresejo, tiel akurataj kiel ĉe eniro de fabriko, por esti fotografpafitaj.

Dua laborkunsido

Post laciga promenado al la ĝusta fotografloko K-do Boubou malfermas la laborkunsidon nur je la 16½-a h. Roux legas saluttelegramojn kaj leterojn de Izgur (Kremenĉug), el Kaunas, Antverpeno, Lisbono, aeroplanleteron el Helsinki, longan kortuŝleteron de politika malliberulo en Bulgario kaj dankon de la Internacia Asocio Biokosma, pro la bonakcepto de la sciigoj en "S-ulo".

Boubou petas Lanty raporti pri *Sennaciulo.* Tiu ĉi respondas, ke la raporto jam aperis en la gazeto; aldone li nur sciigas pri la nova redaktoro, K-do Krestanoff, kiu nun zorgas pri la teknika kaj lingva flanko de la organo, kaj *Lanty* nur pri la ideologia. Nenia kritiko. Prez. Boubou konstatas, ke neniu deziras la parolon, tio sekve signifas, ke la gvidado de *Sennaciulo* ricevas ĉies aprobon.

Pri *Sennacieca Revuo* Lanty mem devas raporti, ĉar el Moskvo neniu ĉeestas, raporto ne estis sendata. Li do raportas negative. Pro la malakurateco de niaj sovetiaj K-doj "S. R." perdis abonantojn. Tiu ĉi situacio ne povas longe daŭri. De nun la gazeto aperos laŭ tri serioj: scienca, pedagogia, literatura. Ĉiu fakestro estos respondeca pri la serio, kiun li prilaboros. La materialo devos esti sendata al Parizo, kaj tie se okazos prokrasto ni prizorgos alian materialon por certigi la akuratecon en la aperado de *Sennacieco Revuo.*

Klopfleisch, ĵus veninta el Sovetio ŝerce diras, ke li parolis kun Nekrasov en Moskvo, kontraŭ kiu ankaŭ estas la K-doj en Odessa ktp. Nekrasov estas redirinta, ke li *principe* ne respondas leterojn! . . . Lanty kvazaŭ senkulpige atentigas, ke, kiel poeto, Nekrasov laboras kiam la muzo inspiras lin. Li ne deziras, ke la Kongreso mallaŭdu K-don Nekrasov, kiu multon faris por SAT en la komenca tempo. Cetere la "kulpulo" firme promesis, ke estonte li laboros pli akurate. Boubou legas la proponon de Nekrasov kaj liaj du kunredaktoroj. Ili proponas la suprediritan de Lanty, opiniante, ke oni povas eldoni 6 kajerojn de literaturo, 2 tekniko kaj 4 eduko. La nova aranĝo komenciĝos en oktobro. Deubler trovas "S. R." tro liberstile skribita kaj proponas, ke anstataŭ ĝi aperu en "S-ulo" speciala aldono, do tutan forigon de "S. R.". Mailand ne konsentas — li tre ŝatas "S. R.". Wolfrum demandas kiom da membroj legas "S. R.". Oni respondas: 1200 laŭ la raporto. Boubou vidas en "S. R." la komenciĝon de grava fako peresperanta. Ĝi kunigu ĉirkaŭ si la plej kompetentajn K-dojn. Pli poste oni povos krei por ĉiu fako apartan gazeton, nun ne. Tial ni ne devas forigi, sed reorganizi la aferon.

Pri *La Lernanto* raportas denove Lanty dirante, ke multaj riproĉoj okazis. La lingvo estas ja tro malfacila kaj ne ĉiurilate korekta. Sed pri la enhavo necesas scii la opinion de la legantoj mem. Persone li ne havas opinion. Ĉu la gazeto devas esti por komencantoj aŭ por perfektiĝantoj? Li tre deziras, ke la lernantoj diru sian opinion pri "L. L." por ke ni povu trovi la ĝustan vojon.

K-dino Danneil diras, ke ĉar *La Lernanto-n* oni legas por lerni, necesas simpligi la stilon. Guhr volas, ke ankaŭ la artikoloj estu pli facilaj. Oni montras la jenan solvon: ke "L. L." estu redaktata de diverslandaj K-doj kun helpo de esperanto-instruistoj. Boubou trovas, ke "L. L." estas la plej komplika el ĉiuj gazetoj. Deubler subtenas lin, deziras la pluan eldonon, sed varme rekomendas al E. K., ke ĝi rilatu kun la landaj organizoj por eviti duoblan presadon de la materialo en aliaj lab. esp. gazetoj. Ĉi tiuj estu la unua fundamenta ŝtupo, kaj "L. L." la dua. Torrent proponas, ke ĝi aperu kun subtitolo "Sennacieca Lernanto".

Lerchner resumas la aferon de ambaŭ lastaj gazetoj. Li konstatas, ke la aperado de "S. R." estis tre malakurata, kaŭzis multajn komplikaĵojn, kaj ĝojas, ke la redaktejo estos en Parizo. La sama estas kun "L. L." — li ne kontentas kun la redaktoro, ĉar tiu ĉi sendas la materialon senorde kaj la administranto devas kunmeti la gazeteton. Li aprobas la transigon ankaŭ de tiu organo en Parizon sub la gvido de la nova redaktoro. Revenante lastfoje al "S. R." li klarigas, ke ne estas aranĝebla la aparta abonado de serioj, ĉar mankas abonantoj por grandaj kvantoj. Oni devas trovi alian solvon. La Prezidanto diras, ke tiun solvon trovos la E. K. kiam la gazetoj estos memstaraj. Lanty pledas por ne tro scienceca serio: ni celos fari, ke la tri serioj estu interesaj por ĉiuj; nur pli poste, en oportuna tempo, ni povos eldoni memstarajn fakgazetojn.

Bässler diras, ke E. K. zorgu pri pli regula aperado de "S. R.". Tiu ĉi

---

zetti, ke " la historio de l' homaro ankoraŭ ne komenciĝis kaj ni vivas ankoraŭ en la unua stadio de l' antaŭhistorio".

La nomoj de l'ŝtato Masaĉusec, de l' guberniestro Fuller kaj de l' juĝisto Thayer restos por ĉiam enskribitaj en la nigraj paĝoj de l' estonta historio. Ili ekzekutis du karajn viktimojn, sed ili neniam mortigos la konvinkojn, la ideojn, ĉar la lumaj ideoj estas senmortaj kaj, malgraŭ ĉio, faras sian vojon.

Sacco kaj Vanzetti mortis en varma atmosfero de tutmonda kunsento kaj superforta batalo por ilia savo. Tio ne estas malgranda konsolo, tiom ke la publika konscienco vekiĝas ne tiel facile kaj tiel propramove. Ili povas dormi trankvile sian eternan dormon — ni nur plidensigos niajn vicojn kaj plifortigos nian batalon kun firma kredo en la devizo de nia "Ruĝa Standardo" kaj forta atentigo al la tutmonda subpremantaro, ke *"Venos tago de l' repago — juĝantoj tiam estos ni!"* Tiam komenciĝos la historio, la vera historio. *I. H. K.*

gazeto pruvas al iuj mondlingvanoj, ke esperanto povas trakti sciencon. Pri "L. L." li trovas, ke la titolo sufiĉas. La valoro de la gazeto ne kuŝas en la titolo. Per ĝi ni volas eduki la lernantojn al sennaciismo, sed la enhavo ne sufiĉe taŭgas. La rubriko "Nia kurso" tute superfluas, ĉar en ĉiu lernolibro estas tia materialo. Necesas, ke ĉiu kritikanto partoprenu la materialon. Tiam ĝi estos unu el la plej valoraj organoj de nia Asocio. Guhr pledas por daŭrigo de la kurso. Lerchner opinias, laŭ faritaj spertoj, ke multaj esperantistoj ne scias ĝuste apliki la adjektivojn kaj adverbojn, la posedan pronomon "sia", la sufiksojn "ig", "iĝ" kaj la participojn. Li do trovas la rubrikon "Nia kurso" tre taŭga. Wolfrum diras, ke se oni forigas la instruan parton, oni kvazaŭ forprenas la tutan animon de la gazeto.

Luque proponas, ke "L. L." aperu kiel aparta paĝo en "S-ulo", sed ne kiel aparta folio. Bässler pledas por aparta eldono de "L. L.", motivigante, ke multaj lernantoj komence abonas nur ĝin kaj poste "S-ulon". Li trovas kelkajn artikolojn superfluaj, ekz. la fabelon "La novaj vestoj de la reĝo", kiu lin naŭzis, tial li ne legis ĝin ĝis la fino. Lanty atentigas, ke ĝuste en la fino la reĝo estas tre trafe primokata, ke la profundsenca fabelo entenas ion revoluciecan. Cetere tiu ĉi artikolo aperis en "L. L." ĉefe pro la stilo, ke por akiri bonan stilon, necesas legi Zamenhofajn tekstojn; kaj sekve ne dependas de ni ĉu la aŭtoro de esperanto estis pacifisto kun iom nebula ideologio.

La prezidanto diras, ke estas nebezone voĉdoni, ĉar ambaŭ aferoj solviĝis, kaj la proponinto Luque ricevis kontentigon.

Estas legata nova propono: Oni sendu al ĉiu grupo plurajn ekzemplerojn de nia organo. Lerchner respondas, ke kiu volas vendi, tiu povas mendi, sed devus almenaŭ post 4 semajnoj sendi la monon. Cetere tio estas afero de la grupoj mem. Soares atentigas, ke multaj K-doj estas vaguloj kaj sekve ne povas aboni, al kio Starr respondas, ke la solvo de la problemo kuŝas ĉe la membroj mem. Glodeau adresigas Soares al la grupestroj. Lerchner konstatas, ke ekzistas inter la multaj tre akurataj perantoj ankaŭ malakurataj, kiuj ricevas vendekzemplerojn, sed ne pagas. Al fidindaj perantoj ni ĉiam pretas helpi. Oni proponas fini la diskutadon — akceptite.

La prezidanto post kelkaj informoj priekskursaj fermas la kunsidon je la 18-a h.

Tria laborkunsido

Dimanĉon, la 14. 8. 27, je la 9½-a h., post malfermo de la kunsido, Roux legas salutojn el Neugersdorf, Sovetio, Ruĝa Uralo, Dachau, Chemnitz. K-do Lanty en la nomo de E. K. faras jenan *deklaron:*

"Je la nomo de la E. K. ni devas doni kelkajn klarigojn pri la hieraŭa elekto de la prezidantaro. Unue necesas rememorigi, ke SAT estas superpartia, superten-denca organizo. Sekve, kiam temas elekti estraron por gvidi la debatojn de niaj kongresoj, la sola konsidero pri la elektindeco de la Kongresestraro devas esti nur ilia sperto, ilia gvidkapableco. Ni deklaras ĉi tie tute sincere, ke nur tia konsidero gvidis nin en la elekto de la K-doj, kiujn ni proponis al vi hieraŭ.

Tamen ni eksciis, ke K-doj suspektas, ke ia konsidero, pri partieco instigis nin. Estis al ni dirite, ke la estraro hieraŭ elektita estas... komunista!...

Granda estis nia miro ĉe la aŭdo de tia diro. Ni ripetas, ke la penso pri partieco ne envenis nian kapon kaj nur la hazardo povus fari, ke fakte la tri prezidantoj kaj la tri sekretarioj estas komunistoj. Se tiel estus, malgraŭ nia absoluta lojaleco rilate ĉi tiun aferon, estus tamen al ni malfacile pravigi nian agmanieron.

Bedaŭrinde por la suspektemuloj la faktoj ne povas pravigi la suspektojn. Ni demandis K-don M. Starr pri lia partianeco kaj li respondis, ke jam de pli ol tri jaroj li eksiĝis el la Brita Komunista Partio. De tiu tempo li estas membro de la Laborista Partio, kiu, kiel sciate, ĝis nun ĉiam rifuzis akcepti la aniĝon de komunistoj. Sekve nur K-doj Bässler kaj Boubou estas kompartianoj. Ĉiu K-do kredeble konsentos, ke la sekretariado de niaj debatoj ne estas malpli grava tasko ol ilia gvidado. Nu, okazos, ke inter la sekretarioj unu, K-do Krestanoff, estas senpartiulo, eksneŭtralulo, ekspacifisto, lastatempe konvertiĝinta en klasbatalanton; la dua, K-do Guma, estas liberecano, kaj pri la tria, K-do Bosma, ni ne havis okazon demandi lin pri lia partianeco.

Se tiu nia deklaro ne povas forigi ĉian suspekton pri nia lojaleco rilate al la diversaj partioj kaj tendencoj, ni deziras, ke la kongresantoj mem proponu aliajn K-dojn por gvidi kaj enprotokoligi niajn debatojn.

Ni ja devas forigi ĉian ajn motivon, ĉian ajn pretekston, kiun oni povus uzi por daŭrigi la senbazan famaĉon, ke la estraro de SAT ne ĉiam honeste agas rilate la diversajn tendencojn."

La Prez. Boubou diras, ke ankaŭ ĉi tie devas ludi rolon la grava leĝo de la plimulteco kaj demandas, ĉu iu volas anstataŭi lin. Deubler asertas, ke li akuzis hieraŭ la E. K. nur pri tio, ke por gravaj postenoj ĝi unue sin turnas al komunistoj, ke ekzemple, la E. K. elektis Borrell kiel konsilanton, dum aliaj certe pli taŭgas; la samo okazis rilate la redaktadon de "L. L.", kiun oni komisiis al tiu K-do. Li bedaŭras, ke Lanty ne parolas pri tio.

K-do Lanty deklaras, ke necesas klareco en tiu afero. Estas nevere, ke la E. K. elektis K-don Borrell kiel konsilanton. Rilate tian postenon E. K. simple funkciigis ĝeneralan voĉdonon. Ĉiu rajtas kandidati. Se la E. K. komisiis al Borrell la redaktadon de "L. L.", tio okazis tial, ke la afero urĝis, ke nepre necesis senŝarĝigi la tiutempan redaktoron (Lanty), ke nia Barcelona K-do ĉiam montriĝis tre fervora kaj helpema, ke cetere nur la sperto povis montri ĉu la komisiito povos bone aŭ ne plenumi la taskon. Lanty aldonas, ke en tia afero neniam la partieco ludis ian rolon, ke hodiaŭ li eĉ ne scias, ĉu Borrell estas komunisto aŭ ne.

K-do el Nürnberg parolas pri la sankciigo de la hieraŭ elektita kongresestraro kaj instigas al voĉdono. Lanty atentigas, ke prezido ne estas honoro, sed laboro, kaj ke li penis nur pri la taŭgeco gvidi. Deubler deklaras, ke la afero pri la prezidado ne estas tiel simpla — la E. K. estonte pli zorgeme priatentu tiun aferon. K-dino France miras, kial K-do Deubler ne diris jam ĉe la elektado, kiun li ŝatas vidi elektita. K-do Bässler akcentas, ke la prezidantaro estas ĉiam kontrolata de ĉiuj kaj ke la malkontentuloj povis plendi. Li estas preta ĉiam foriri de tiu loko, kiun li suriris nur laŭ peto. Klopfleisch suspektas, ke Deubler kvazaŭ intence ŝveligas tiun aferon, kaj Glodeau aldonas, ke estus granda eraro opinii, ke la E. K. konsistas nur el komunistoj; fakte nun nur li en Paris estas kompartiano. Robert opinias, ke sufiĉas esti esperantisto kaj SAT-ano.

Marceau Dessoit plendas, ke li vidas en "S-ulo" nur artikolojn de komunistoj, ke tiujn de anarkistoj oni ne enmetas. Lanty postulas, ke li citu faktojn. Tiamaniere oni denove enmiksis la gazetaferon. Bässler proponas ĉesigon de la debato. Ĉar oni trovis Deubler malprava, tiu akcentas, ke li tute persone diris al Lanty pri lia neatento al aktivaj SAT-anoj, kiuj ofte plendis pro tio, ke oni tro simpatias al komunistoj. Ĉar tiu afero tro tedis, venis propono por la ĉesigo de la debatoj, kio, kontraŭ kvar voĉoj, estas akceptita. Lanty petas la kongreson voĉdoni, ĉu la jam elektika prezidantaro restu, aŭ ne. Boubou sin defendas dirante, ke li ja montris sin hieraŭ, kiel ĉiuj vidis, ne partiema, detenante sin, kvankam li estas tre kritikema. La afero estas ĉesigita kaj la prezidantaro aprobita.

La Prezidanto transdonas la parolon al K-do Bässler por raporti pri la *Gazetservo de SAT.*

Bässler raportas pri la funkciado de la gazetservo. La taskoj de nia gazetservo estas detale priskribitaj en la Jarlibro kaj en "S-ulo". La Sovetiaj K-doj estas la plej agemaj, kaj ni devas formeti el la sovetiaj raportoj almenaŭ 60%. Kunlaboras K-doj de multaj tendencoj: socialistoj, komunistoj, anarkiistoj k. a. La laboro estas farata post nia panakira okupo. Estas reprezentantoj en 30 landoj (kelkloke po 2—3): Sud-Afriko, Alĝerio, Anglio, Argentino, Aŭstrio, Belgio, Brazilio, Bulgario, Ĉekoslovakio, Ĉinio, Danio, Estonio, Finnlando, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Japanio, Jugoslavio, Kanado, Latvio, Litovio,

Nederlando, Norvegio, Polio, Portugalio, Sovetio, Svedio, Svisio kaj Usono. Speciale organizita estas la gazetservo en Sovetio. Ni dissendas la materialon en ĉiujn regionojn aparte, kondiĉe ke la Sovetiaj K-doj pagos la elspezojn. La franclingva kaj germanlingva reprezentantoj sendas ankaŭ nacilingve tradukitajn raportojn al Belgio kaj Svisio. Dum la unua kvaronjaro estas dissenditaj 56 raportoj, el kiuj aperis 51. Nur 15 K-doj informis nin pri la represo de la raportoj, do la statistiko tute ne estas kompleta. Dum la dua kvaronjaro estas dissenditaj 71 raportoj. Laŭ informoj ricevitaj ĝis 8. 8. 27 de 22 K-doj estas presitaj 59 raportoj. La reprezentanto de internacia sportkorespondado petis kunsendi ankaŭ ties materialon — do unu plian folion da sportraportoj. En "S-ulo" ankaŭ aperis raportoj de nia gazetservo. Por montri kiajn raportojn oni ne devas sendi, la K-do mencias la nepresitajn. Li montras kiom da mono estas en- kaj elspezita.

Oni diskutas la raporton. Mailand raportas pri sia regiono. Lerchner atentigas pri nia arestita K-do Bubo en Jugoslavio. Interalie li mencias la ekzemplon de la saksaj piedpilkludantoj en Moskvo. La telegrafa raporto de Nekrasov pri la rezulto estis tiel rapida, ke la Sport-Asocio en Leipzig havis ĝin post kelkaj horoj. Tiel ni devas labori.

Boubou legas deklaron de la Alĝeria grupo, en kies nomo K-dino Louzon proponas forigon de la gazetservo, ĉar mankas redaktoroj, tempo kaj mono. Boubou diras, ke ĝuste pro tiu manko ni fondis la gazetservon. Bässler defendas la gazetservon. Ĉiu internacia organizo, kiu havas gazetservon, estas pli forta kaj pli fidinda. Li petas la reprenon de tiu deklaro. Lanty aldonas kelkajn vortojn, akcentante ke ĉefa estas la *rapideco*. La materialo, kiun ricevas Bässler estas tuj uzebla; tiu sendita por "S-ulo" devas unue esti prilaborata, poste sendata al presejo, kompostata ktp.; sekve kiam la gazeto atingas la abonantojn, tiu sama materialo povus per nia *Gazetservo* jam delonge esti uzata. Starr dubis ĉe la fondiĝo de la gazetservo pro la rivaleco kun "S-ulo" kaj trovas, ke por la disvastigo de aktualaĵoj la gazetservo devas ekzisti. Harmsen rakontas la aranĝon de la afero en Nederlando kaj alvokas gardi tiun aparaton kaj ĝian gvidanton. Häckel parolas ankaŭ favore. Roux esprimas ĉies opinion dankante Bässler kaj petas, ke oni zorgu kelkafoje aldoni fotojn al la tradukotaj artikoloj por pli efika dokumentigo. K-dino Limouzin atentigas pri la financa flanko de la afero kaj diras, ke la pliampleksigo de "S-ulo" estus pli elspeziga ol la funkciado de la gazetservo. Bässler alvokas pri forta kritiko de la aparato, por ke ni povu lerni el ĝi. Bildojn li ne sukcesis duobligi. Li atentigas pri la ilustrita germana laborista gazeto, "AIZ", kiu havas nun 300 000 abonantojn en la tuta mondo kaj sur kies lasta paĝo estas ankaŭ esperanta teksto. Li instigas la K-dojn sendi salutleterojn al tiu grava gazeto, dezirante la esperantan tekston sur ĉiuj paĝoj. Tien oni sendu la fotojn, ĉar ili plej valoras por tiu gazeto. Al Lerchner ŝajnas, ke K-dino Louzon ne ĝuste komprenis la taskon de la gazetservo. Precipe la lasta devas funkcii — tie oni utiligas artikolojn por ĉiuj tendencoj, dum "S-ulo" raportas tute partineŭtralece. Forigo signifus malforton de nia movado, kaj la malforto efektive ne ekzistas ĉe ni. Mailand plendas, ke ĉe li la lab. gazetoj tre malofte akceptas artikolojn gravajn por la Laboristaro. Liebetrau, kiel kongresgasto, en la nomo de "INO" informas pri ties gazetservo kaj subtenas tiun de SAT. Boubou diras, ke estas tre malfacile radakti gazeton kiel "S-ulon", ĉar la korespondantoj ne estas pagataj. Estas necese, ke oni interligu la tri SAT-servojn: tiun de SAT, de INO kaj la Pedagogian. Ni kaŭzu ĵaluzecon inter la lab. gazetoj, por ke ili venu al ni, vidante ke la esperantistoj povas havi trafajn dokumentojn el ĉie. Lanty faras reĝustigon pri la fakoj de SAT, dirante, ke INO ne estas fako de SAT kaj Liebetrau eĉ ne SAT-ano. Boubou faras alian reĝustigon: ankaŭ lia pedagogia servo ne estas oficiala SAT-servo, sed li povos ĝin oficialigi per E. K. Bässler atentigas pri perado de individuaj leteroj. La individua korespondado devas daŭri, ĉar ekz. Sovetiaj K-doj ne povas sendi leterojn al kelkaj landoj.

Ĉar neniu plu deziras la parolon K-do Boubou finas la diskuton denove dankante al Bässler pro la konstanta laborado.

Roux sciigas, ke morgaŭ matene ne okazos kunsido pro la fakaj kunvenoj kooperativa, studenta, instruista.

La kunsido estas fermata je la 12-a h. kun komuna kantado de la "Internacio".

Kvara laborkunsido

Dimanĉe, je la 14.30-a h. K-do Bässler malfermas la laborkunsidon. Li petas, ke oni elektu komisionon por studi la proponojn. Estas voĉdonita propono elekti la saman komisionon, kiu studis la rilatojn inter SAT kaj LEA, por studi la diversajn proponojn presitajn en "S-ulo". Akceptite.

Sekvas daŭrigo pri la raportoj faritaj de E. K. Bässler demandas, ĉu iu volas fari iun kritikon. Temas pri la *rilatoj inter S. K. kaj E. K.* Deubler petas partan pardonon por K-do Jonas, kiu, pro grava malsano kaj familiaj ŝanĝoj, ne povis aktive partopreni. Neniu plu volas paroli kaj la afero rapide marŝas.

Redaktora demando — la afero estis jam diskutita kaj solvita.

Rilatoj inter Direkcio kaj Administracia Komisiono. Neniu parolas. Cetere tiuj rilatoj estis ĉiam amikaj.

Raporto de Literatura Komisiono (Kooperativo). Demouliers deziras scii, ĉu la eldonaĵoj estas profitdonaj por SAT. Lerchner respondas, ke ĝuste la librofako formas kvazaŭ la financan bazon de nia ekzistado, ĉar el la kotizoj kaj abonmono restas nenia profito por la Asocio; de "S. R." ni eĉ havas malprofiton. Ni bezonas monon por reeldoni kelkajn elĉerpitajn librojn, ekz. "For la Neŭtralismon", "Nur Volu" kaj "Kontraŭ Dio". Pri aliaj eldonaĵoj (insignoj ktp.) neniu deziras la parolon.

Nun venas la demando pri *akcibiletoj de la eldonfako.* Lerchner klarigas, ke tiuj akcibiletoj ankaŭ havas grandan valoron por niaj membroj — kiam tiuj ĉi senlaboriĝos, ili estas kvazaŭ asekuritaj kaj tiamaniere ricevos "S-ulon" kaj membreco daŭros. Per la mono de la akcioj SAT havas la eblecon eldoni novajn verkojn.

Raporto pri la Jarlibro. Deubler deziras, ke estonte oni donu la adreson ne nur de unu, sed laŭeble de 2—3 perantoj, samkiel ke la peranto donu sian loĝejan adreson. Krom tio oni enmetu ankaŭ la adresojn de la hungariaj esp. lab. grupoj. Oni faru tion, por ke la Jarlibro utilu al ĉiuj. K-dino Limouzin atentigas, ke ĉar la Jarlibro elĉerpas tiom da mono, oni povas forigi iom da balasto.

Lerchner respondas al Deubler, ke li kompilas la Jarlibron, sed tiu laboro estas grandega kaj streĉiga pro la realiĝoj, reabonoj ktp., kiuj alvenas ĝuste en la tempo de la kompilado. Li petas, ke alia K-do prizorgu la eksteradresajn aferojn. Pri la adresoj de hungariaj lab. grupoj li ricevis peton ne mencii ilin, oni scias kial. Senŝarĝigi la Jarlibron estas nefacila afero pro la diversaj gustoj. Estas tuŝata ankaŭ la demando pri afranko — ju pli ampleksa la Jarlibro despli multekosta ĝi fariĝus. Estas propono de la Leipziga SAT-anaro, ke ni senŝarĝigu la adresaron per nemenciado de la pasivaj membroj, citante nur la numeron. Per tiu ĉi aranĝo oni esperas egaligi la aferon pri la *demandiloj.* Parolas K-do v. d. Heid por forigo de alia balasto, kaj Mailand por nenia forigo. Lerchner pledas por pli konscia akcepto de SAT-anoj — oni ne uzu la Jarlibron por korespondpetoj. La pasivaj membroj estas akceptindaj, ĉar ili helpas mone.

La *Prezidanto* legas deziresprimon de Deubler: "1. Inter la lokaj adresoj signi per *P* ne nur unu adreson, sed kelkajn, kiuj estas uzeblaj de K-doj; 2. Interrilati kun LEA-organizoj por enmeti ties grupajn adresojn, speciale en lokoj kie SAT ne estas reprezentata aŭ reprezentebla."

Harmsen demandas kiel oni elektas la perantojn, ĉar li estas elektita sen lia scio. Deubler trovas memkompreneble, ke en lokoj kie estas 5 SAT-anoj

oni elektu K-don, kiu lasas speciale signi sian adreson. R o u x atentigas pri la danĝera aspekto de la Deubler'a propono. Oni ne publikigu nur la adresojn de perantoj, ĉar aspektus kiel "delegito" aŭ "oficialulo".

La danĝero aspektus duobla — oni ja ne volas, ke SAT estu kiel neŭtrala asocio. Ni ne devas timi, ke la Jarlibro fariĝus tro granda, kontraŭe. L e r c h n e r diras, ke la peranta afero ŝajnas tikla. La perantoj havas nur administran laboron, la K-doj mem devas zorgi pri bona peranto en siaj lokoj. Ĉar la germania poŝta tarifo lastatempe estas plialtigita, oni priparolu la aferon pri kolektiva ekspedado de la gazetoj, por eviti plialtigon de la abonprezoj. Li rekomendas, ke en pli grandaj lokoj oni faru sekciojn kun perantoj.

R o b e r t atentigas pri la ortografio de kelkaj francaj vortoj. L e r c h n e r rediras, ke oni ne povas imagi al si, kian salaton oni ricevas — **la K-doj skribu la adresojn preslitere.** K-dino F r a n c e konsentas kun li; laŭ ŝia sperto pasivaj membroj fariĝas nur papermembroj. La Prez. B ä s s l e r proponas ĉesigon de la diskuto kaj invitas voĉdoni la deziresprimon de Deubler. Unuanime akceptita.

Raporto pri la projekto de propra presejo. K-do L e r c h n e r traktas ĉi aferon de la administracia vidpunkto. Li diras, ke ĉiujare SAT donas al la presejo 25 ĝis 30 milojn da markoj kaj, se ni mem presus niajn eldonaĵojn, same tiujn de LEA, nia movado multe profitus kaj ne nur finance, sed ankaŭ morale. La profiton, kiun ni havus, ni povus tre bone utiligi por la esperanto-movado mem. Sed iu afero timigas lin kaj tio estas la malfacila montranssendo de niaj Sovetiaj K-doj. Se ni havus presejon kaj farus la samajn spertojn; kiujn ni faris dum la lasta tempo, ni kompreneble devus bankroti, ĉar malgranda entrepreno ne povas rezisti al krizoj.

B ä s s l e r diras, ke li kiel fakulo ĉion sufiĉe profunde konsideris kaj, ke la tuta afero estas tre favora al ni, se ni senĝene povus labori. Lerchner jam citis unu malfacilaĵon, kiu ĝenus nin en nia laboro. Sed ne nur tio malhelpus nin, ankaŭ alia grava faktoro ekzistas kaj tio estas la ĉiam plivastiĝanta faŝismo en la diversaj landoj. Jen la faktoroj, kiujn ni antaŭe ne konsideris.

V o n d e r H e i d opinias, ke oni tro supraĵe rilatis tiun demandon kaj diras, ke malgranda presejo neniam estas profitdona kaj ke nia movado estas ankoraŭ tro juna por fari tiun gravan paŝon.

Al D e u b l e r la afero ŝajnis komence tre subteninda, sed poste li preferis ne starigi konkuran entreprenon, sed doni la komisiojn al laboristaj entreprenoj. Eble post *2* aŭ *3* jaroj, kiam la cirkonstancoj estas pli favoraj, oni povas efektivigi ĉi ideon.

B o u b o u demandas kiun opinion havas la E. K. pri la demando. L a n t y respondas, ke la E. K.-anoj ne estas presfakuloj kaj sekve ne havis propran opinion pri la afero. Ili nur fidis al la Leipzigaj K-doj, kiuj ĝis nun ĉiam montriĝis spertaj rilate organizadon kaj administradon. Tamen, antaŭ ol konsenti pri publikigo de alvoko en "S-ulo", estis interŝanĝitaj multaj longaj kaj detalaj leteroj. Plie per cirkulero la Sektor-Konsilantoj estis demanditaj kaj nur post la aprobo de la plimulto la E. K. faris la decidan paŝon. Kiam poste montriĝis ĉe la horizonto nebuletoj ĝenantaj la antaŭeniradon, ni decidis atendi ĝis la nuna Kongreso, por ke ĝi prenu mem la respondecon pri la projektita entrepreno. Sekve la E. K. neniel intencas influi la decidon de kongresantoj.

Partoprenas ankoraŭ multaj K-doj la diskutadon, sed preskaŭ ĉies opinio estas prokrasti ĉi aferon.

L e r c h n e r citas projekton de Kolĉinski, temas pri loterio havigonta iom da mono por fondi la presejon. Ĉar oni prokrastis la presej-projekton, la Kongreso sendiskute flankenmetis la projekton pri loterio. *(finota.)*

FAKAJ KUNVENOJ DUM LA VII-a SAT-KONGRESO

Fervojistoj.

Laŭ la alvoko de SAT-ano 265 lundon, la 15. 8. 27, je la 10-a h. okazis kunveno de la fervojistoj. Ili intencas fondi fakunuiĝon en la kadro de SAT por ĉiuj trafikistoj, fervojistoj, poŝtistoj, tramistoj.

Ĉeestis 11 K-doj el Francio, Germanio, Svisio kaj provizore estis fondita la fakunuiĝo. Oni esperas en estonto pli viglan laboron. Opinioj kaj proponoj povos esti publikataj en *Sennaciulo,* por havi en la venonta kongreso sufiĉe da materialo por diskuti. *1162-Leipzig.*

Komunistoj.

Lundon vespere la komunistaj kongresanoj kunvenis en la popoldomo. En la komenco de la kunsido kom. K-do el la kongreskomitato legis ĵus alvenintan de la Centra Komitato de la Kompartio Tutgermania telegramon, kiu aplaŭde estis akceptita. La regiona gvidanto de l' Kompartio Lyon'a salutis la ĉeestantaron kaj esprimis plej varman simpation. Tiu ĉi K-do kun ĝojo akceptis komision en la nomo de l' kunsido atentigi la C. K. de la Kompartio Francia pri pli serioza rilatado al nia movado, kvankam li mem ne estas esperantisto.

Kiel gvidanto de la komfrakcio el SAT-anoj unuanime estis elektita K-do Bässler-Leipzig, kaj la Leipzig'aj komfrakcianoj elektu anstataŭanton.

Kooperativanoj.

La K-doj sin informis reciproke pri la kooperativa movado en sia lando. Estis decidite rilati kun K-do Zawada por starigi imformservon, kiu dokumentos la kooperativajn societojn aŭ organojn.

La kunsidantoj decidis sendi saluttelegramon al la Internacia Kongreso Kooperativa en Stockholm je la nomo de nia VII-a.

Ruĝaj Frontbatalantoj.

Interkonsente kun la gvidantaro de Lyon'aj Ruĝaj Frontbatalantoj (GDA- kaj IG-anoj) okazis sabaton, la 13. 8. 27, komuna kunveno de ĉiuj esperantistoj-ruĝfrontanoj ĉeestantaj la kongreson kun la Lyon'aj Ruĝfrontanoj.

Atendante la lastajn en granda festhalo de urbdomo de la 3-a kvartalo, subite aŭdiĝis elsur la stratoj ilia kantado, kiu tre entuziasmigis la ĉeestantojn; tiuj ĉi nombris ĉ. 150.

Paroladis K-do B ä s s l e r en la nomo de la laborista-esperantista militsekcio, legante leteron de K-do Nikolskij-Smolensk, kiu pro malhelpo de la franca registaro ne povis ĉeesti. Li informis, ke la esperantista militsekcio jam havas ĉelojn en Francio, Anglio, Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Hispanio, Estonio, Germanio, Svedio, Belgio, Sovetio. La plej grandajn sukcesojn ĝi havas en Germanio kaj Sovetio. Li akcentis, ke la militsekcio devas esti unu el la plej bonaj iloj por la propagando de la ideo: "Militon kontraŭ la milito mem." Lia parolado kaj la tre lerta tradukado de K-do Roux estis ofte interrompataj de entuziasmaj aplaŭdoj.

Post tio K-do Bässler salutis speciale en la nomo de Tutgermania estraro de Ruĝfronto, de distriktestraro Okcidentsaksia kaj de sia taĉmento 11-a en Leipzig. Detale li skizis la laboron kaj vivon de la Ruĝa Fronto. Kvankam la plimulto de la Lyon'aj Ruĝfrontanoj ne povis sekvi la esperantlingvan paroladon, ili ĉiuj tre atente aŭskultis kaj dum la tradukado ofte aplaŭdis.

K-do Klopfleisch, ĵus veninta el Sovetio, salutis la Gek-dojn en la nomo de la Ruĝarmeanoj kaj de la Sovetia Proletaro. Denove entuziasma aplaŭdego aŭdiĝis.

Poste estis legata salutletero de germana K-do Rödel, kiu depost unu jaro loĝas en Sovetio, lastatempe en Moskvo. En la fino de la kunveno la gvidanto de la Lyon'aj Ruĝfrontanoj per flamaj paroloj pledis por plej aktiva, komuna laboro kaj promesis, ke ili certe en estonto interrilatos kun ni en esperanto.

La Lyon'aj K-doj adiaŭis kantante la "Revolucion". Komune kantante la INTERNACION esperante kaj france ĉiuj disiris kun la bondeziroj, ke la Tutmonda Ruĝa Fronto vivu plej dense ligata per esperanto.

Angla admiralo diras....

Admiralo Dumas diris jenon: Neniu oficiro, batalinta dum militado, dezirus novan militon... Moderna milito estas naŭziga negoco! La plej grava danĝero dum tia batalo estas: *la restado* de la politikistoj prirespondecaj *malantaŭ* la batalvicoj! Post ĉiu milito oni venigu tiajn personojn antaŭ tribunalon kaj kondamnu ilin je morto! Se denove politikistoj aranĝus militadon inter popoloj, mi volonte, post la fino, akceptus estro-oficon ĉe tia tribunalo!"

Jen la paroloj de *militisto.* — Ni SAT-anoj, helpu edukadi niajn idojn kaj K-dojn laŭ tiaj paroloj! — Milito kontraŭ milito! *(1851)*

La sangaj okazintaĵoj en Vieno

La Viena Revolucio, pri kiu ni parolis en n-o 149, vekis intereson en la tuta mondo. Aro da mensogoj plej stultaj estis disvastigita per la burĝa gazetaro. Tamen pli kaj pli evidentiĝas, ke la revolucia eksalto de la popolamaso estis motivita ne nur per la atenco kontraŭ la justeco, sed ankoraŭ per la provoko de la polico kaj la gvidantoj.

Ĉi sube ni donas en intereso de la vero *ankoraŭ unu eĥon* pri tiuj okazintaĵoj. Tie estas montritaj kelkaj faktoj, kiujn menciis ankaŭ la konata aŭstra socialgvidanto Frederiko Adler en sia priparolado komence de aŭgusto en la Pariza Kooperativa Unuiĝo. Ni kredas, ke la tempo ne malvalorigis ilin kaj niaj K-doj povas ankoraŭ ion lerni. *Red.*

Proleta sango ruĝkolorigis la stratojn de Vieno. Dum du tagoj mortpafis furioziĝinta policistaro pli ol 100 gelaboristojn, pli ol 1000 kuŝas en la hospitaloj kaj tremas pri sia vivo. Neniam Vieno ankoraŭ travivis tiel terurajn tagojn kiel vendrede la 15-an kaj sabate la 16-an de julio. Kiel povis okazi tio? — Dum januaro okazis en la ĝis tiam nekonata Burgenlanda urbeto Ŝatendorf kunveno de la tiea respublika ŝirmligo. Samtempe la tieaj faŝistoj kunvenis en alia gastejo. Dum la hejmmarŝado de la ŝirmliganoj, ili preterpaŝis la ejon de la faŝistoj. Kelkaj fikrioj sufiĉis por la faŝistaj krimuloj, pafi el la fenestroj de la gastejo al la preterirantaj laboristoj. Du mortigitoj kaj kelkaj vunditoj estis la rezulto de tiu malkuraĝa atako. Venonttage la tutaŭstria Laboristaro akre protestis kontraŭ la ĉiamaj fimortigoj de K-doj. Granda estis la ekscito de la laboristoj, multaj K-doj jam estas mortigitaj kaj neniu murdisto povas plendi, ke la aŭstria klasjuĝistaro estus puninta lin. La registaro promesis ĉion entrepreni por kontentigi la laboristojn. La tri krimuloj estis kaptitaj, juĝitaj kaj liberigitaj... La malkondamno trafis la aŭstrian Laboristaron kiel fulmo el serena ĉielo. Ankoraŭ dumnokte la elektra Laboristaro decidis venonttage per unuhora striko protesti kontraŭ tiu klasa juĝo. Ankaŭ la cetera Laboristaro ekstrikis propramove kaj marŝis en la internan urbon sur Ringstrato, la historian lokon de laboristaj bataloj, por dokumenti sian malkontentecon.

Tute discipline marŝadis la amaso en la urbon ĝis kiam subite la policanoj haltigis la anaron. Post intertraktoj de socialdemokrata deputito kun la polica oficiro povis la amaso pluen marŝi. Sen ia kaŭzo subite policanoj sur ĉevaloj atakis per sabroj la trankvile marŝantan amason. La unuaj vunditoj ruliĝis surtere. La dume pligrandiĝinta anaro per tiuj malkuraĝaj atakoj plene ekscitiĝis, ŝtonoj estis ĵetitaj kontraŭ la furioze atakantaj policistoj, kiuj jam per revolveroj pafis en la homojn. La amaso mem ne plu estis haltebla... Tio estis la komenco de kruelega hombuĉado flanke de la polico kontraŭ senarmita popolo. La policistaro tute freneziĝis. Senelekte ĝi pafis en forkurantajn virinojn, infanojn ĉirkaŭstarantajn, kaj eĉ samarianoj, kiuj portis vunditojn, ne estis indulgitaj. Ankaŭ en hospitalon, kie la vunditoj estis portitaj, oni sendis salvojn.

Ĝis noktmezo daŭris tiu buĉado. Jen kelkaj epizodoj. Kelkaj junuloj kiel scivolemaj observantoj surrampis ian trabaron; okaze de tiu atako policano malsuprenpafis junulon. Patro, surdorse portis sian 6-jaran fileton; oni la infaneton de la dorso pafe faligis. Deksepjara junulino, sola surstrate kuranta kaj serĉanta ian ŝirmon, falis trapenetrita de multaj kugloj. Graveda virino restas surstrate kiel viktimo, du vivoj samtempe estingiĝis. Oni povus citi multegajn kruelajn epizodojn, kiuj montras, ke la intenco de la “plej bona polico de l' mondo“ ne estis fari ordon, sed satigi venĝosoifon.

Vespere la socpartia estraro proklamis por la 16-a ĝeneralan strikon kiel proteston kontraŭ la malhoma agado de la policaj faŝistoj. Ankaŭ sabate la policistaro daŭrigis la homĉasadon. Pro tio la urbestro decidis starigon de *propra komunuma polico,* kiu estas elektita el la vicoj de niaj ŝirmliganoj. Tiu polico estas armita, kaj ĝi certigis al nia urbo la revenon de trankvilo.

Nun la polico arestas ĉiun, kiu kuraĝas nur vorton diri publike kaj cenzurigas gazetojn, kiuj atakas la registaron pro la okazintaĵoj. En la parlamento, la ĉefministro pastro S e i p e l deklaris nenian kompaton al la viktimoj, nenian helpon al la postrestantoj.

Malgraŭ la multegaj viktimoj estas la forto kaj volo de la Aŭstria Laboristaro ne rompita. Tagoj de l' repago certe venos, la sango de centoj ne vane fluis.

Slezak.



TAGO EL MIA VIVO

Tria fervoja haltejo de ĉefurbo Praha kuŝas en montetriĉa regiono, kaj proksime sur rivero Beronnka — pligranda vilaĝo Ĉ. Pli ĝuste, ĉi tiu estas formata el du vilaĝoj kunigitaj, kiuj posedas ĉirkaŭe 400 domojn, plejparte vilaojn. Estas ankaŭ ekskursa loko. Somere estas tie ĉi tre vigle, ĉar multe da homoj el la ĉefurbo veturas en arbaron aŭ riveron por ludi, bani sin ktp.

En ĉi tiu ĉarma loko mi nun laboras. Mi estas 19-jara junulo, tajloro kaj mi antaŭ jaro foriris “por spertiĝi“. Kiel aliaj Gek-doj mi ankaŭ volas montri mian “belan“ tagon en la vivo. Bedaŭrinde, mia “sorto“ min ne favoras kaj pro tio mi ne povas priskribi ĝin tiom “feliĉe“, kiel kelkaj skribintaj Gek-doj.

Do mia labortago komencas jene:

Matene je la 7½-a h. mi jam ellitiĝas, lavas kaj vestas min, post tio matenmanĝas kafon kaj panon. Je la 8-a h. komenciĝas mia laboro (kudrado), kiu daŭras seninterrompe ĝis la 12-a h. Poste mi tagmanĝas (ofte mi havas tre proletan manĝaĵon) kaj dum unu horo, kiun mi havas libera, mi sidas sur la benko je sunlumo (vintre mi devas resti interne). Je la 13-a h. mi jam denove komencas labori ĝis la 19-a h. Tiam mi estas tre lacigita, ĉar mi devas dum la laboro pleje nur sidaĉi, kio certe ne estas tre agrabla. Ĉar mia labortago estas tro longa, restas al mi nur malmulte da tempo por legadi, lerni esperanton, amuzon ktp., kaj vespere mi iras (pro



SAT-ano 7320

sano mi devas) promeni, ĉar de tuttaga sidado kaj laboro en ĉambro, estas por mi tio tre necesa. Ofte, semajne vespere aŭ dimanĉe (se mi dimanĉe antaŭtagmeze ne laboras!), mi ludas violonon; ĝi estas ĉio, kio min krom esperanto ĝojigas. Domaĝe, ke tie ĉi estas neniu esperantisto aŭ grupo, kiun mi volonte vizitus por konversacii. Miaj laborkondiĉoj estas tute simplaj: noktan loĝejon kaj nutraĵon, kiu ofte ne estas tute bona, kaj al tio mi ricevas semajne tre malmultan monon. Malmulte perlabori, sed multa kaj longa laboro estas devizo de miaj “sinjoroj majstroj“. Se mi kontraŭdiras tiun ĉi “minimumon“, ili minacas per vortoj: “mi donos al vi t. n. daŭran forpermeson!“ Ĉar ĉe ni estas multe da senlaboraj sammetianoj, ili povas elekti anstataŭ unu — dek. (Al la 1-a de aprilo estis 60 260 senlaboruloj de ĉiuj profesioj.) Tial mi ne povas labori ok horojn, ja multaj senlaboruloj prenas laboron eĉ je dekdu horoj tage. Aliaj laboras ĉe diversaj firmoj ekz. kiel helpantoj je konstruoj kaj alimaniere. Krom en grandaj urboj oni ne ĉie laboras ok horojn. Tion ĉi kaŭzas la multo da metianoj kaj la reganta senlaboreco. Kiel vi vidas, en Ĉeĥoslovakio tajloraj laboristoj ne estas bone honorataj kaj la laboro estas malŝatata.

SAT-ano 7320, Ĉeĥoslovakio.

TRA ESPERANTIO

Por grupoj

Estas necese koni ankaŭ la historion de loka grupo. Pro tio nia grupo, jam dekomence, de la ekzisto de la grupo, posedas libron kun multaj paĝoj "sen iu surskribita vorto". Nome en ĝin la K-do bibliotekisto surgluis ĉiujn artikolojn, gazet- eltranĉaĵojn, anoncojn ktp. pri nia grupvivo, esp.-movado, kursoj, kongresoj k. s. el la gazetaro loka, regiona aŭ regna, kiujn niaj grupanoj legis kaj transdonis al nia K-do. Per tio ĉiu grupano havas eblecon, studadi la esp.-movadon en nia regiono, kaj li ne povas forgesi ĉiujn gravajn okazaĵojn. —

En strato de urbo ni pendigis montran keston kun interesaj bildoj, sciigoj, anoncoj k. a. Ankaŭ anoncoj pri kunvenoj de *aliaj* proletaj unuiĝoj estas montrataj. Per tio ni pli kaj pli ankaŭ interesigas aliajn ne-esperantistojn por nia movado. — Ĉiuokaze, dum kunvenoj, manifestacioj, festoj ktp. niaj K-doj, parolas kiel *esperantistoj* pri la temo de la kunveno, ligante esp-on kun aliaj problemoj kaj movadoj. — Bonvolu sendi informojn pri la temo: Kiel plej bone oni povas propagandi inter gelernantoj, instruistaro kaj "gepatraj unuiĝoj", por enkonduko de esp-o en lernejon?

Esperanto-Informejo *Schweidnitz, Germanio.*

Ĉe la laboruloj.

GRAVA SUKCESO!

La 5-a tutlanda Konferenco de l' Asocio de Poliaj Liberpensuloj, okazinta la 17. 3. 27 en *Varsovio,* akceptis jenan rezulucion:

"La tutlanda Konferenco de la A. de P. L., konstatinte, ke manko de komuna lingvo internacia malfaciligas al la Proletaro la interkompreniĝon k. per tio la kreon de fortaj ligiloj internaciaj, decidas komenci agadon, celantan al enkonduko en la lernejojn de la helplingvo internacia (kiu nuntempe estas esperanto) apud la gepatra lingvo de la gelernantoj. La Konferenco vokas la laborist-organizojn al propagandado por esperanto inter la laborista klaso kaj al fondo de kursoj de ĉi lingvo."

*

TRA LA MOVADO
(Kroniko)

Aŭstrio. En *Salzburg* la SAT-grupo arangĝas grandstilan propagand-kunvenon kun lumbild-parolado. — **Francio.** En *Parizon* alveturis post la VII-a SAT-kongreso multaj alilandaj K-doj. Ilian ĉeeston niaj ĉi tieaj K-doj bone utiligis por propagandaj celoj. Krom la granda Internacia Amaskunveno, okazinta la 19. 8. 27 en la *Laborborso,* kie paroladis K-doj Krestanoff, Lerchner, Klopfleisch, Bässler k. Salvado, okazis ankaŭ esp. paroladoj en aliaj urbopartoj. En la *sindikatejo* parolis K-do Bässler je la nomo de la germaniaj ruĝfront-batalantoj k. proletoj. La 20. 8. 27 vespere la Regiona Direkcio de la Franca Kompartio okazigis aron da kunvenegoj pri Sacco k. Vanzetti. En unu el ili la sama K-do proklamis la solidarecon de la germana Proletaro. Dum la kunvenegoj de la 20. k. 26. 8. 27 paroladis unue kontraŭ la kondamno k. poste kontraŭ la fimortigo de Sacco k. Vanzetti nia K-do Klopfleisch, alvokante pri kunligo de la Proletaro en la ruĝa unuecfronto por emfaze kontraŭbati la impertinentaĵojn de la kapitalismo. — **Polio.** La V-a tutlanda Konferenco de l'Asocio de Polaj Liberpensuloj, okazinta en *Varsovio,* akceptis favoran rezolucion pri esp-o. — **Sovetio.** Dank' al klopodoj de Odessa SAT-anaro Radiotelefona Stacio en *Odessa* (1,2 kv. ondlongo 975 m.) enkondukis esp-on en sian programon. La 3. 8. 27 okazis la unua parolado pri esp-o: "Kial oni bezonas internacian lingvon". Ĉiumerkrede je la 9-a h. posttagmeze (Moskva tempo) la sama Radio-Stacio disaŭdigas similajn propagandajn paroladojn en rusa lingvo. Krom tio je la 9. 30 estas disaŭdigata informo pri lastaj novaĵoj en Sovetio esp-e. En septembro estas arangĝata regula radio-kurso esp-a. Eksterlandaj K-doj, aŭskultantaj tiun radiostacion, volu komuniki siajn impresojn pri la esp. parto de ĝia programo.

Ĉe la neŭtraluloj.

Eĥo de la Danciga kongreso.

"La ĉefa sensacio de la dimanĉo estis *la plantado de la Jubilea Kverko* en Zopot. Imagu belan peceton en arbaro, apud verde-freŝa herbejo; la placeton ĉirkaŭas rondronde krono da arbetoj! Belega tiu ĉi placo certe estos post dek aŭ dudek jaroj, kiam la abioj jam estos atingintaj ioman altecon. Sur la placo nun staras ankaŭ la Jubilea Kverko, kaj en unu angulo troviĝas impona memorŝtono kun surskribo en Esperanto kaj germana lingvo: "Esperanto Grund — Jubilea Kverko plantita de la partoprenantoj de la XIX-a Universala Kongreso de Esperanto en Danzig kaj Zopot por la memoro de la 40-jara ekzisto de la internacia lingvo Esperanto, 31. 7. 1927." ... Malgraŭ la varmego, malgraŭ la atendado, malgraŭ la manko de refreŝigeblo, kaj kvankam la alportita tero, anstataŭ kovri la radikon de la kverko, grandparte dispolviĝis aeren, la tuta ceremonio estis tre impona."

Tion raportas *"Heroldo de Esperanto"* de la 19. 8. 27 en sia fruntartikolo "Sub la Verda Standardo".

Admirinda estas la obstino de la partoprenantoj — *malgraŭ ĉio,* ili plantis ĝin... Sed kia malfeliĉo: la alportita tero ankaŭ dancis... en la aero, malgraŭ la varmega vetero! Ni nur povas kondolenci la s-rojn "plantantojn" pro tiu blovo, kiu certe venis el Oriento por "dispolvigi" la sterkon super tiu *sensacia* "monumento"...

*

Esperanto en Radio

Post la decido de la Universala Telegrafa Unuiĝo en oktobro 1925, nun la *Internacia Unuiĝo de Radiofonio* esprimis deziron favoran al esperanto. Konsiderante, ke la nombro de la radio-amatoroj ĉiam plinombriĝas, tio ĉi estas bela sukceso por ĉiuj esp-istoj. Jen la dezir-esprimo:

"La Internacia Unuiĝo de Radiofonio rekomendas al la stacioj fari provon de regulaj disaŭdigoj en esperanto unufoje semajne dum dek aŭ dekkvin minutoj, por anonci al la malproksimaj aŭdantoj la gravajn punktojn de sia ĉiusemajna programo aŭ por konigi al ili okazaĵon artistan, intelektan aŭ ekonomian de ilia vivo nacia. Ĝi rekomendas al ili same anonci siajn staciojn unufoje tage en esperanto dum la vesperaj programoj."

Gravega alvoko

Kamaradoj-abonantoj! Jam de kelka tempo la poŝtministro de Germanio klopodegis *plialtigi la afrankon* por ĉiuj poŝtaĵoj. Kiam li publikigis la unuan projekton multaj protestoj de ĉiuj flankoj aŭdiĝis en diversaj gazetoj. Tiam oni denove diskutis ĉi projekton en la poŝtministerio kaj feliĉe... la regna parlamentanaro ferias, rapide oni devas dikti la novan poŝttarifon kaj subite ekde la 1. 8. 27 validas tiu nova tarifo. Anstataŭ kiel ĝis nun (unu ekz. de "S-ulo" kostis al ni 3 pf.) ni devas pagi 5 pf., por 1 ekz. Sekve ni devas pagi por *unu jarabono* t. e. 52 n-oj 2.60 mk. g. nur por la afranko. Estas kompreneble, ke ni ne povas senatente preterpasi tiun gravan plialtigon de la poŝttarifo.

Kion ni povas fari por eviti la altigon de la abontarifoj? Nu, tiu demando estas facile respondebla. Estas necese, ke la K-doj pritraktu tiun aferon en la kunvenoj kaj komisiu la perantojn, ke la administranto sendu la gazetojn *kolektive* al la peranto kaj ĉi tiu disdonu ilin al la abonantoj. Kompreneble la perantoj devas esti ĝisostaj akuratuloj, por ke prokrasto en la liverado de la gazetoj al 'a abonantoj ne okazu. Ekzistas parto de perantoj, kiu jam delonge ricevas la gazetojn kolektive kaj tre bone plenumas profite al nia Asocio tiun malgrandan devon. En pli grandaj lokoj ankaŭ sufiĉas, se du K-doj-abonantoj interkonsentas, ke ni sendu ambaŭ gazetojn al unu adreso. K-doj ne hezitu kaj tuj informu la Administracion rilate kolektivan sendadon de la gazetoj! Konsideru, ke ni denun devas pagi proksimume 50.— mk. g. pli por afranko semajne ol antaŭe.

Same ni atentigas la K-dojn *neniam forgesi la afrankon por la respondo kaj ĝuste afranki la poŝtaĵojn.* *Adm.*

MEMORNOTO

Represis el "Sennaciulo":

Työnääni, Vaasassa, n-o 90; "Sacco k. Vanzetti".

Enhavas notojn pri SAT:

Vlastj Truda, Irkutsk, 7. 8. 27 (Pri VII-a SAT-Kongreso, SAT ktp.). — *Salzburger Wahrheit,* Salzburg, 7. 8. 27 (Kio estas SAT). — *Le Progrès,* Lyon, 28. 7. 27 (Alvoko pri VII-a SAT-kongreso), 12. 13. 14. 15. 16. 17. 8. 27 (Detalaj raportoj pri nia VII-a kun unu bildo). — *Lyon Républicain,* Lyon, 14. 15. 16. 17. 8. 27 (Raportoj pri nia VII-a kongreso). — *L'Humanité,* Paris, 12. 19. 8. 27 (Pri la VII-a SAT-kongreso k. pri la Internacia Amaskunveno Esp-a).

Tradukis el esperantaj leteroj:

L' Humanité, Paris, 22. 8. 27 (La subpremo en la burĝaj armeoj).

Enhavas priesperantajn artikolojn:

Bulletin d'information de l'I.T.F. Amsterdam, julio 1927 (La lingvaj malfacilaĵoj en la internacia vivo). — *Sächsische Arbeiter-Zeitung,* Leipzig, 22. 8. 27 (Dum vojaĝo en "Malamiklando").

✯ DIVERSAĴOJ ✯

K-doj bankoficistoj!

Bonvolu sendi al mi informon pri laborado, mastrumado kaj pri similaj faktoj en bankoj, borsoj kaj "mon-institutoj". Ankaŭ pri ĉi tiu temo estu sciigata la Proletaro! Ne forgesu: Dum kaj post renverso de kapitalista sistemo la mono estas tre grava fakto! Memoru ĉiam tion!

Esperanto-Informejo, Schweidnitz, Germ.

K-doj stenografiistoj!

Bonvolu sendi al mi materialon por ekspozicio pri stenografi-sistemoj, aranĝota aŭtune ĉi-jare. Se eble aldonu resuman klarigon en esperanto aŭ germana lingvo. Rekompence mi sendos propag. PK. pri stenografio "Arends". Antaŭan dankon!

Esperanto-Informejo, Schweidnitz, Germ.

NEKROLOGO

La 31. 7. 27 mortis pro daŭra kaj suferiga kormalsano la plej maljuna (62-jara) SAT-ano en Ĉita (Sektoro 12)

K-do A. Starkov

Li estas unu el la pioniroj kaj fondintoj de esp. movado en nia urbo (antaŭ 1910). Li ĉiam ĝis la morto klopodis multe kaj batalis kuraĝe pro nia sennacieca lingvo kaj eĉ tagon antaŭ sia morto, estante malforta kaj duonviva, li akre kontraŭdiris iun el vizitintaj lin personoj, dirintan ion kontraŭ esp-o. Li tro alte taksis SAT-on kaj opiniis sian aliĝon al ĝi tro granda honoro por si.

N i h o n o r u l i a n m e m o r o n.

Ĉita'a SAT-grupo.

ENHAVO:

Ŝtata justeco estas nur vorto, de I. H. K. . . . . pĝ. 1—2
VII-a Kongreso de SAT (daŭrigo de la raporto) . . . . . . „ 2—5
Fakaj kunvenoj dum la VII-a SAT-Kongreso . . . . „ 5
Angla admiralo diras, de 1851 . . „ 5
La sangaj okazintaĵoj en Vieno, de Slezak . . . . „ 6
Tago el mia vivo, de 7320 . . . „ 6
Tra Esperantio . . . . „ 7
Memornoto . . . . „ 8
Diversaĵoj, Nekrologo . . . . . „ 8
Korespondado, anoncoj . . . . . „ 8

K · O · R · E · S · P · O · N · D · A · D · O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. or., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl. = poŝtmarko sur bildflanko, k. ĉ. l. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Aŭstrio.

Adresŝanĝo: Gek-doj *Johann* k. *Grete Strasser,* Kasernengasse, 20/16, *Wien, VI* (stratŝanĝo). La agentejo restas en Sandwirthg.

K-do *Adolf Neuwirth,* Rosenstr. 180, *Bregenz a. B.* (Vorarlberg), dez. interŝ. PI, L, k. ĉ. l., krom Germanio.

Belgio.

Adresŝanĝo: K-do *Gustave Basteels,* peranto de SAT en Belgio, loĝas nun 43, Rue René Henry, *Anderlecht* (stratŝanĝo).

Britio.

Adres-ĝustigo: La Lab. Klubo en London avertas pri sia ĝusta adreso k. petas, ke oni tion korektu en la Jarlibro. Al ĉiuj gelab. esp-istoj, vizitontaj Londonon ni donos elkoran k. fratecan bonvenon. Sekr.: K-dino *Helen Sheriff* (2844) 144, High Holborn, *London, WC, 1.*

Ĉekoslovakio.

K-do *Rudolf Dutz,* Fabrikstr. 19, *Elbogen,* dez. koresp. k. ĉ. l., L, PK, PI. Ĉiam resp.

K-do *Franz Brückner, Neusattl-Glasfbk, 206, b. Elbogen,* dez. koresp. k. ĉ. l. L, PK, PI. Ĉiam resp.

Germanio.

K-do *Eugen Jeremias, Stuttgart-Botnang,* Rosenstr. 12. — Respondo garantiata.

K-do *Karl Kranich, Stuttgart-Botnang,* Stuttgarter Str. 56.

K-do *Willy Schmidt,* Spremberger Str. 9, *Weisswasser* (O.-L.), dez. koresp. kun Gek-doj el ĉ. l. pri div. temoj, prefere per PI. Resp. garantiata.

K-do *Bernhard Lehmann,* Schwielowseestr. 2, *Caputh i. Pr.,* dez. koresp. kun masonistoj-laboristoj kaj teknikistoj pri ĉ. temoj k. ĉ. l. Resp. garantiata.

K-do *Wilhelm Reffgen,* Jahnstr. 82, *Düsseldorf,* dez. koresp. k. ĉ. l. pri ĉ. temoj. Resp. garantiata.

Adresŝanĝo: K-do *Gustav Hindorf* (antaŭe en Hamburg), nuna adr.: Schulterblatt 59-a, Haus 3, I. r., *Hamburg-Altona.*

K-do *Karl Stolz,* Weinbergstr. 44, *Rüsselsheim* (Hessen), dez. koresp. k. ĉ. l. pri ĉ. temoj per L, PK, PI.

K-do *Heinrich Lehmann,* Pfännerhöhe 45, *Halle a. S.,* dez. koresp. kun elektropraktikistoj el ĉ. l.

K-do *Emil Hübner,* Bogenstr. 6, *Fürth i. Bay.,* dez. koresp. k. ĉ. l. pri ĉ. temoj, L, PK, PI. Certe resp.

K-do *R. Rudolph,* n-o 160-b, *Olbersdorf ap. Zittau i. S.,* dez. koresp. k. ĉ. l. pri div. temoj, precipe lab. kondiĉoj, eduk. metodoj ktp. Resp. garantiata.

K-do *Herbert Wobst,* Wormser Str. 59, III, *Dresden-A. 19,* dez. koresp. k. ĉ. l., precipe kun Francio k. Belgio. Ĉiam resp.

Jugoslavio.

K-do *Budimir Ĉoliĉ* (22 j.), „Singer", *Valjevo,* dez. koresp. k. ĉ. l., precipe kun gejunuloj pri div. temoj.

Sovetio.

K-do *Johano Palaŝĉuk,* elektra provizejo, Gos. Metallurg. Zavod, *Kramatorskaja,* Donbass., dez. koresp. k. ĉ. l., resp. garantiata.

K-do *K. M. Smirnov* (pedagogo-instruisto). Institut Socialnogo Perevospitania, *Vjatka,* dez. koresp. kun samprofesianoj el ĉ. l. pri edukado de nezorgitaj kaj krimemaj geknaboj.

K-do *Sibarov,* Ukom esperantistov, *Buzuluk,* Samar. gub., dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l.

Adresŝanĝo: K-do *Ŝ. Goldfeder* (antaŭe en Kremenĉug), nuna adreso: "Esperanto", redakcia "Krasnij Altaj", *Barnaul,* Siberio.

K-do *B. Goldfeder,* Skripnicka 8/4, *Ĥarkov,* interŝanĝ. PM k. ĉ. l. Certe resp.

K-do *S. Golanski* (junkom-isto), str. Gorovic, 16, 7, *Kiev,* dez. koresp. k. ĉ. l., pri ĉ. temoj.

— Kvin vivĝojaj fraŭloj dez. interŝ. L, PM, il. gaz. Adr.: K-do *Dujkin,* str. Libkneĥt, 14, 3, *Kiev.*

Adresŝanĝo: K-do *I. Ŝibaev* (7404), *Avramievskaja,* 29/12, *Smolensk* (stratŝanĝo).

— Prez. de loka Komitato, n-o 10 de komercŝipista sindikato, dez. koresp. kun proforganizoj de komercŝiparoj. Adr.: *Kovalenko,* Boriĉev-bok, 30, 2, *Kiev-Petrovka.*

K-do *Sergeo Sevastjanov,* Borisoglebskaja, 12, *Orel,* dez. koresp., interŝ. gaz. kun ekstereŭropaj esp-istoj.

— Ni serĉas seriozan, gajan k. daŭran koresp-adon pri div. temoj k. ĉ. l., resp. garantiata. Skribu al adr.: *Dnepropetrovsk,* Esperanto-Komitato de SEU (Por Labesko), Prosp. K. Markso, 98, loĝ. 12.

— Komenconte la migradon K-do *Belogorcev-Tomsk* devas ĉesigi koresp-adon kaj peti pardonon de siaj koresp-antoj ĝis havo de konstanta adreso.

K-do *A. Savkin,* Vasilevskaja, 75, *Kamenskoje,* Dneprop. okr., dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l.

Usono.

Adresŝanĝo: K-do *Willy Sieler,* 48, Schubertstr., *Binghamton, N. Y.* (antaŭe en Gera, Germanio).

K-doj!

Dum la tutaŭstria varbsemajno ni tre bezonas *ekspozici- kaj propagandmaterialon.* Bezonaj estas gazetoj ilustritaj kaj poŝtkartoj diverslandaj (afranko bildflanke).

Volu sendi al ni tiajn.

Esperanto-Grupo, Mauer b. Wien, Siedlerheim "SAT", Aŭstrio.

Atentu

Tramistoj el la tuta mondo!

Korespondon kun samfakanoj pri dejorkondiĉoj, salajro, kontrolsistemo, biletvendado ktp. deziras K-do **A. Liebs,** Bautzener Strasse n-o 129, **Dresden-N 6,** Germanio.

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)